# Jura Semajno

**Semajna Bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio**

**Novembro 2 : 2025**


## FABRIKANTOJ DE PAF-ARMILOJ NE RESPONDECAS PRI TIES UZADO FARE DE KRIMINALAJ GRUPOJ




La Supera Usona Tribunalo rifuzis plendon de la meksika registaro kontraŭ fabrikantoj de paf-armiloj. Ili estas konsiderataj de ĉi tiu registaro kiel lastaj respondeculoj de la violentaj agadoj de la drog-karteloj en Meksiko.

La ĉefa prijuĝata afero estis decidi ĉu fabrikado de paf-armiloj en Usono favorigas ties kontraŭ-leĝan vendadon kaj poste uzadon fare de kriminalaj korporacioj. La Supera Tribunalo konsideris, ke sendube tiu kontraŭ-leĝa vendado ekzistas, tamen la meksika registaro neniel kaj neniam pruvis, ke fabrikantoj de paf-armiloj partoprenis en tiu fivendado aŭ ke ili deziras favorigi ĝin. La Kortumo ankaŭ konsideris, ke se fabrikantoj de armiloj vendas siajn produktojn al grocistoj, kiuj poste revendas la paf-armilojn al drog-karteloj en Meksiko, tio ne aŭtomate signifas, ke fabrikantoj konas la lastan celoj de tiuj armiloj venditaj.

Malĝraŭ ĉi tiu kontraŭa juĝo, la Supera Tribunalo de Usono ja agnoskis, ke fabrikantoj de paf-armiloj povas agadi pli efike se ili deziras koni kiujn estas tiuj kontraŭ-leĝaj finaj aĉetantoj, ĉefe se ili kontrolas la vendadon al grocistoj. Tamen, la tribunalo kvalifikis tiun mankon de agado de la fabrikantoj kiel “indiferentan agon”, ne kiel “kunlaboradon” kun tiuj grupoj.

La tribunalo asertis, ke paf-armiloj estas leĝaj produktoj, kiuj estas amase akirataj de komunaj aĉetantoj, do oni ne povas konkludi, ke paf-armiloj estas produktataj nur por esti vendataj al tiuj kriminalaj grupoj.

Siafoje, la meksika registaro anoncis, ke ili daŭrigos ĉiujn eblajn leĝajn kaj diplomatiajn vojojn por montri la damaĝojn okazigitajn al Meksiko de la fabrikantoj de paf-armiloj en Usono, ĉar ĉi lastaj nutras la fiajn agadojn de la grupoj kiuj atencas kontraŭ la paco kaj sekureco de la meksikaj familioj. Fine, la meksika registaro deklaris, ke ĉi tiuj plendoj almenaŭ utilas por montri al ĉiuj, ĉefe al usona publiko, la terurajn rezultojn de la vendado de usonaj paf-armiloj en teritorioj de aliaj ŝtatoj.

# *Vorto de la Semajno*

## DEMOKRATIO

Politika reĝimo, en kiu la decidpovo apartenas, aŭ pere aŭ senpere, al la popolo.

**DEMOKRATO**: partiano de la demokratia sistemo.

**POPOLDEMOKRATIO:** Nomo donita dum la jaroj 50 de la 20a jarcento al la politika sistemo de la landoj, regataj de socialisma koalicio kun superrego de komunista partio.

**SOCIALDEMOKRATIO:** Politika ideologio, kiu subtenas ekonomian kaj socian intervenon fare de la ŝtato kadre de liberalisma demokratio kaj kapitalisma miksa ekonomio.

<u>Sinonimoj</u>: *liberalismo, plurismo, toleremeco.*

*Demokratio agnoskas, ke homoj estas denaske liberaj kaj tial jure garantias, ke ĉiu homo povas praktiki siajn rajtojn kadre de konstitucio kaj leĝoj.*

**INTERNACIA JURISTA ESPERANTO MOVADO**

**www.esperantojuro.org**

**jurista@esperanto.ac**